FERVOJA ESPERANTISTO

Informilo de Germana Esperanta Fervojista Asocio

Mitteilungsblatt der Deutschen Eisenbahner-Esperanto-Vereinigung in der Stiftung Bahn-Sozialwerk

Fondita 1952 | Numero 4 | Oktobro/Decembro 2003

Laborkunveno en Bremen

10a/11a de oktobro 2003.



Foto: W. Barnickel

De maldekstre:
GEFA-sekretario Bodo Ehrlich,
GEFA-prezidanto Rolf Terjung kaj
Distriktkomisiito Karl-Heinz Marzahn



Wir trauern um Achim Gießner
* 23.12.1913 † 25.11.2003

Das Unvorstellbare ist geschehen. **Achim Gießner** ist tot. Am 25. November 2003, einige Wochen vor seinem 90. Geburtstag, ging er für immer von uns. Mit ihm verlieren wir einen der profiliertesten Eisenbahner-Esperantisten nach dem Kriege. 46 Jahre hat er als unser Präsident GEFA geprägt. 22 Jahre lenkte er als Präsident die Geschicke von IFEF. Er hinterlässt wegen seiner außergewöhnlichen Persönlichkeit und seiner Leistung für Esperanto eine nicht zu schließende Lücke.

Die Beisetzung fand am 2. Dezember 2003 in Otterbach bei Kaiserslautern statt. Kondolenzadresse: Irma Ritthaler, Reichenbacher Straße 76, 66879 Kottweiler-Schwanden.

Joachim Gießner hat durch sein sprachliches und musikalisches Gespür unzählige Opern-, Operetten- und Volkslieder, Bücher und Schriften in Esperanto übersetzt oder selbst geschrieben. Von morgens bis zum Abend, buchstäblich bis zu seinem Tod, hat er seine Tage dem Esperanto gewidmet. Unzählige, verdienstvolle Ehrungen sind ihm zuteil geworden. Er ist Träger des Bundesverdienstkreuzes und der FISAIC-Goldmedaille. Er ist Ehrenpräsident von IFEF und des Esperantoklubs „Jiři Kořinek“ in Ŭsti n. Labem, Tschechien. Er ist Ehrenmitglied in UEA, FISAIC und im Esperantoklub Žilina, Slowakei, und er war ein hoch geehrter Mitarbeiter in der Stiftung BSW. Sein letzter großer Wunsch ging noch in Erfüllung: Der IFEF-Kongress in seiner Heimatstadt Dresden.

Mit ihm verlieren wir einen guten Freund und einen unermüdlichen GEFA-Präsidenten. Wir trauern um ihn mit seiner Frau Irene und seiner Familie. Es tröstet uns sein erfülltes Leben.

Jarraporto 2003 de la libertempa grupo *Esperanto* en la fondaĵo BSW ek de la jarkunveno en oktobro 2002 in Baiersbronn ĝis la jarkunveno en oktobro 2003 en Bremen.

Statistiko

Unue malgranda statistiko: Fine de 2002 ni havis 179 membrojn. El tiuj estis 104 (58%) donacantoj (membroj) de la Fondaĵo BSW. Sekve estis 75 membroj (42%) ne-donacantoj. El la tuta membraro estis 23 (13%) ne-fervojistoj. Aktive deĵoris 6 (3,4%). Se oni subtrahas de la ne-donancantoj tiujn 23 ne-fervojistojn, restas ankoraŭ 52 (29%) eblaj donacantoj por la solidara-komunumo Fondaĵo BSW. Kiel en aliaj kulturaj grupoj ankaŭ, ni suferas pri tro maljuneco de la membraro. Junuloj tute mankas.

Strukturo

La strukturo de nia Esperanto-grupo estas nur malfacile komparebla kun la strukturoj de la alia kulturaj grupoj en la Fondaĵo BSW. Esperanto-parolantoj estas pleje individualistoj, kiuj ĉefe kontaktas kun Esperanto-parolantoj el aliaj landoj, en nia kazo kun fervojistoj. Ili ne nepre devas esti membro de iu ajn Esperanto-grupo, kvankam kunlabori en grupo ĉiam havas certajn avantaĵojn. Tial ankaŭ fondiĝis Esperanto-grupoj en la regionoj, plej ofte kune kun ne-fervojistoj, ties celoj estas, sin pliklerigi en la lingvo-kapableco per multflankaj aktivecoj en societema rondo.

Partopreno 2003 en alilokaj okazaĵoj

En la raportita tempo estis kunorganizitaj aŭ vizititaj okazaĵoj de aliaj Esperanto-grupoj, ankaŭ de ne-fervojistaj, en la propra- kaj eksterlando. La nombroj de la partoprenintoj variis inter 30 kaj 200 personoj. Menciinda estas la regula partopreno en la internaciaj Esperanto-kongresoj de la fervojistoj aŭ en la ĉiujaraj Esperanto-mondkongresoj (2003 en Gotenburgo kun 1800 partoprenintoj el 62 landoj), kie ĉiam ankaŭ estas renkontiĝo de fervojistoj el tiuj partoprenantaj landoj. En Gotenburgo kunvenis 60 fervojistoj kaj amikoj el 16 landoj. En la kongreso de la Germana Esperanto-Asocio, en la jaro 2003, GEFA kaj Fondaĵo BSW, kulturgrupo Esperanto, oficiale transdonis salutojn.

Internacia Fervojista Esperanto-Kongreso en Dresden 2003

La plej multe da laboro en la tempo de nia raporto ni dediĉis al la preparlaboro kaj okazigo de la „Internacia Fervojista Esperanto-Kongreso“ en Dresden, kiu okazis de la 10-a ĝis la 16-a de majo 2003. Tre ĝenis nin en la preparlaboro la tiea somera inundo. Kelkfoje ni devis prokraski laborkunsidojn en Dresden. Ni eĉ timis, ĉu la kongreso vere povus okazi tie. Sed fine ni sukcesis okazigi tiun kongreson al bone organizita kaj laŭdinda, en kiu

partoprenis ĉirkaŭ 280 vizitintoj (sen tiuj multaj aktoroj) el 16 landoj. Sen subteno flankede la Fondaĵo BSW kaj GEFA, tiu kongreso ne povis estiĝi al tiom granda sukceso kaj ĝi eble eĉ ne povis okazi en Germanio. Ankaŭ tiuj kulturaj programoj certe estiĝis iom pli modestaj.

Tiel ni povis, ankaŭ pro privata donaco, malpliigi la partopren- kaj loĝkostojn por partoprenintoj el iamaj socialismaj landoj. Aliĝis ankaŭ ĉiniaj kolegoj, sed kiuj pro vizaj problemoj ne povis partopreni. Al la kongreso en la jaro 2006 eble ĉinaj kolegoj invitos nin al Cinio.

La senco de Fervojista Esperanto-Kongreso estas por montri, ke Esperanto kapablas precize esprimi sin en ĉiu ajn temo, tie ĉi en fervoja, ĉu teknika aŭ ĝenerala. En Dresden ekzemple okazis sep fervoje tipaj prelegoj. La ĉeftemo pritraktis la „Teknika evoluo por la estonteco de la eŭropa fervojtrafiko". La venontaj IFEF-FISAIC-kongresoj okazos 2004 en Sopron (Hungario), 2005 en Brasov (Rumanio) kaj 2006 eble en Pekino (Ĉinio).

Aliaj GEFA-okazaĵoj en Germanio 2003

Pro la internacia kongreso en Dresden ne okazis nia renkontiĝo de veteranoj. Nia jarkunveno je la 10-a kaj 11-a de oktobro 2003 en Bremen estis pro la sama kaŭzo nur laborkunveno kun la distriktkomisiitoj kaj laborkomisiono.

Fakĵurnalo „Fervoja Esperantisto"

Nia fakĵurnalo „Fervoja Esperantisto" aperis kvarfoje kun entute 40 paĝoj kaj 17 fotoj. La enhavo estis skribita parte germane kaj parte en Esperanto. La internacia fakĵurnalo „Internacia Fervojisto" aperis en la sama tempo sesfoje. Ĝi raportis detale pri nia „Internacia Fervojista Esperanto-Kongreso en Dresden.

Laborkunveno en Bremen

En la laborkunveno en Bremen ni decidis inter aliaj, ke

1. la printempa labortago kun distriktkomisiitoj kaj laborkomisionoj okazos je la 13-a de marto 2004 en Fulda.
2. la renkontiĝo de la veteranoj estos je la 22-a de aprilo en Würzburg
3. la GEFA-jarkunveno okazos de la 08-a ĝis la 10-a de oktobro en Gelsenkirchen
4. verki novan faltfolion
5. Rolf Terjung transprenas la oficon de prezidanto de GEFA..

Do, nia jarkunveno en la jaro 2004 okazos de la 8-a ĝis la 10-a de oktobro en Gelsenkirchen sub la slogano „ BSW estiĝas 100 jaraĝa". La temo de nia jarkunveno ankaŭ povus teksti „Fervojo – hieraŭ kaj ie alie".

Kie oni instruas Esperanton?

Unue per helpo de nia propra, por fervojistoj evoluitaj „Esperanto-Fernkurse". Informoj donas Karl Bernhard, Sauerbruchstraße 8, 67063 Ludwigshafen, Tel/Fakso: 0621-51 0782, retpoŝto: karlbernhard@surfeu.de kaj Fritz Lautenbach, Abtstor 21, 36037 Fulda, Tel/Fakso: 0661-7 76 27, retpoŝto: f.lautenbach@fulda-online.de.

Pliaj kursoj:

- Por junuloj: „Esperanto – paŝo post paŝo (Esperanto – Schritt für Schritt)".
- En universitatoj kaj en multaj urboj: „Esperanto – semajnfinaj intensivkursoj" por komencantoj.
- „Esperanto – telekurso (Esperanto – Fernkurs)"

Informoj: „Germana Esperanto-Asocio (GEA)", Immentalstraße 3, 79104 Freiburg, Tel: 0761-28 92 99, Fakso: 0761-28 92 96, Retpoŝto: GEA@esperanto.de. En la librovendejo estas havebla la libreto „Esperanto – Wort für Wort" el la „Kauderwelsch-Reihe" des Peter-Rump-Verlages.

Resumo de la datoj 2004

1. Printempa labortago kun la distriktkomisiitoj kaj laborkomisiono: 13-a de marto 2004 en Fulda.
2. Renkontiĝo de la veteranoj: 22-a de aprilo 2004 en Würzburg.
3. GEFA-jarkunveno „100 jaroj BSW": 08-a – 10-a de oktobro 2004 en Gelsenkirchen.
4. IFEF-FISAIC-Kongreso: 08-a – 15-a de majo 2004 en Sopron, Ungarn, kun postkongreso en Székesfehévár.

Rolf Terjung, HB Esperanto
Finkenschlag 68, 47279 Duisburg
Tel/Faks: 0203-72 40 95

Esperanto-Kalendaro

17.-24.01.2003 Turisma Fervojista Esperanto-Skisemajno en Argentiere
Inf.: Peyrouty Hubert, 6 Villa de Progrès, FR-94230 Cachan, Francio
05.-12.04.2003 20a Printempa Semajno Internacia (PSI) en Duderstadt.
Inf.: Wolfgang Bohr, Johannes-Kirschweng-Str. 11,
53474 Bad Neuenahr-Ahrweiler – retpoŝto: psi@esperanto.de

Ein Leben für und mit Esperanto
Willi Barnickel wurde verabschiedet.

Der Anfang

Eigentlich begann schon alles im Herbst 1950, als im Amtsblatt der DB in Fulda ein Esperantokursus angeboten wurde. Schon die ersten Informationen über Esperanto in der ersten Lehrstunde faszinierten Willi Barnickel so stark, dass er hängen blieb. Eine Sprache, leichter zu erlernen als andere Sprachen, mit der man sich mühelos mit Gleichgesinnten in aller Welt verständigen kann – welch eine Aussicht! Das beflügelte das Lernen, zumal Schulkenntnisse in anderen Sprachen hilfreich waren.

Die ersten Erfahrungen

Mit großen Erwartungen, viel Mut und wenigen zugeteilten Devisen besuchte Willi Barnickel im Mai 1951 seinen ersten, den 3. IFEF-Kongress in Paris – ein Traumziel für Deutsche nach dem zweiten Weltkrieg. Hier, unter 400 Kolleginnen und Kollegen aus 11 Ländern, fühlte er sich endgültig zur großen Familie der Esperanto-Sprechenden zugehörig. Esperanto-Zeitungen, Literatur, Wörterbücher und nicht zuletzt Briefwechsel mit Kollegen aus anderen Ländern begleiteten ihn fortan. Die vielen besuchten IFEF-Kongresse und eine Reihe von UEA-Kongressen bestärkten seine Ansicht, auf dem richtigen Weg zu sein.

Sein Leben für und mit Esperanto

Ab 1956 bestimmte Esperanto einen Teil seines Lebens, denn 1956 wurde Willi Barnickel zunächst Mitglied in der Esperanto-Bewegung, später auch Mitglied im Vorstand der Esperanto-Gesellschaft Frankfurt. (Hier ist auch der Nobel-Preisträger Selters Mitglied.) Dann kamen viele, nicht unerhebliche Aufgaben hinzu: Mitglied im Arbeitsausschuss von GEFA, Mitglied bei GEA/DEB und UEA. Sprach- und Kursleiterprüfungen schlossen sich an und führten ihn zum Deutschen Esperanto-Institut, wo man ihn zum Prüfungskommissar bestellte.

Für die DB übersetzte Willi Barnickel Werbeprospekte in Esperanto und für GEFA übernahm er die Übersetzung und Herausgabe von den Internationalen Übereinkommen CIV und CIM über den Eisenbahn-Personen- und Güterverkehr. Daneben entwarf er GEFA-Klebemarken und für IFEF-Kongresse in Deutschland Embleme und Plakate. Interviews mit GEFA-Veteranen wurden auf Tonband aufgenommen. Gelegentlich befragte ihn Radio Frankfurt über die Internationale Sprache. Außerdem versuchte er einige internationale Veranstaltungen filmisch zu dokumentieren.

Gern denkt Willi Barnickel an die jahrelange, für uns enorm wichtige Tätigkeit als Schriftleiter unseres GEFA-Organs „Bulteno / Fervoja Esperantisto“ zurück

Dank und Schluss

Herzlichen Dank, Willi Barnickel! Nun verlässt du unser Schiff, aber du bleibst, um bei diesem Bild zu bleiben, noch eine Weile im Rettungsboot, um uns mit dem einen oder anderen Artikel für unser „Fervoja Esperantisto" oder „BSW-Magazin" zu erfreuen.
Zum Schluss deine eigenen Worte: „Nun liegen alle seinerzeit übernommenen Tätigkeiten in anderen Händen. Ich beschränke mich mehr auf die Rolle eines Beobachters – wie es das Alter gebietet."



„Esperanto" in Fulda

Am Donnerstag 16 Oktober 2003 wurde in Fulda der Grundstein für ein multifunktionelles Kongress- und Kulturzentrum gelegt. Unmittelbar neben dem ICE-Bahnhof in der Barockstadt entstehen: Eine Kongress- und Konzerthalle für bis zu 4500 Besucher, ein 4-Sterne-Hotel mit 330 Zimmern und 6 gastronomischen Angeboten, Parkhaus, eine Multifunktionshalle, die im Winter eine Eisbahn enthält und in den übrigen Jahreszeiten Platz für kulturelle Veranstaltungen und Messen bietet, sowie ein Hallenbad mit Schwimm- und Solebecken sowie Sauna und Wellnessbereich.
Das Zentrum wird den Namen „Esperanto" tragen



Kiu pretas traduki?

Pasintjare aperis 3-a eldono de la fervoj-terminologia datumbanko "RailLexic" de Internacia Fervojunio UIC en 19 lingvoj, ankaŭ en Esperanto. Kvankam Terminara Sekcio de IFEF tradukis ĉiujn **terminojn**, restas granda nombro da netradukitaj **difinoj**.

Jen io pri la nombroj: La nocioj havas la ŝlosilnumerojn de 00001 ĝis 12689, sed de ili ĉirkaŭ 200 numeroj estas vakaj. Al nur malgranda parto – kvinono - de la nocioj apartenas la necesaj difinoj, tamen la difinoj entute nombras ĉirkaŭ 2300. UIC enigis la difinojn en angla, franca kaj germana (parte nur en unu aŭ du el tiuj tri) lingvoj. Sekve por la aliaj 16 lingvoj – ankaŭ Esperanto – necesas tradukoj el unu de la menciitaj tri lingvoj. Inter la jaroj 1996 kaj 1999 Terminara Sekcio de IFEF jam tradukis pli ol 500 difinojn, do restas 1800 ankoraŭ tradukendaj. En IFEF preskaŭ ne kunlaboras kolegoj kun angla gepatra lingvo. Sekve ĉefe francaj kaj germanaj "gepatrolingvuloj" estas serĉataj por la tradukoj.

Karaj gekolegoj, ni IFEF-anoj ĝis nun komplete kaj akurate liveris al UIC niajn necesajn kontribuojn. Pro tio ni ricevis de tie reputacion de kapabluloj kaj diligentuloj. Ni konsciu pri tio kaj daŭrigu tian gravan kunlaboron. El tiuj faktoj rezultas mia helpo-peto, ankaŭ al gekolegoj, kiuj ĝis nun ne kunagis en Terminara Sekcio: Kiuj el vi GEFA-anoj pretas traduki kiom da germanlingvaj difinoj? Por iomete trankviligi vin: 1 difino ampleksas averaĝe nur 2 normale longajn tekstoliniojn. Jen ekzemplo de tipa difino :

11978 Menge der beförderten Personen, Güter oder Fahrzeuge nach Zeit und Richtung auf einem bestimmten Streckenabschnitt.

Kiuj pretas tradukante kunlabori, bonvolu informi min al jena adreso:

Heinz Hoffmann telefono 0351 8385877
Finstere Gasse 2 retpoŝto IFEF.B90GR-mei@t-online.de
01445 Radebeul

Tiukaze mi sendos liston kun dezirata nombro da germanlingvaj difinoj.

Anticipe dankas Heinz Hoffmann.

Fervojaj informoj

3100 DB-lokomotivoj kaj grandrapidaj trajnoj estos ŝanĝkonstruitaj dum la venontaj 15 jaroj por la nova Eŭropa Trajnkontrolsistemo (ETCS). Tiu ĉi harmonigas la teknikan fervojsistemon de eŭropaj fervojoj.

Batalante kontraŭ prezfavoraj flugbiletoj DB vendas en la interreto ĉiun lundon revenbiletoj je reduktita prezo de 50 eŭroj al elektitaj germanaj urboj, ekzemple Berlin - Köln aŭ Hamburg - München.

La fervoja riparejo en Opladen estas definitive fermita fine de 2003 malgraŭ fortaj protestoj de fervojistsoj. Kaŭze: regreso de laboro.

Posedanto de komputiloj kaj de kreditkarto povas mem presigi fervojbiletojn per t. n. Online-sistemo.

Sub la 1870 m^2 vitra tegmento de la nova ĉefstacio en Berlin troviĝas 78000 ĉeloj, kiuj produktas pojare 160000 kilovatojn da elektra korento. Tiu fluas en la urban elektran reton.

Novaj kriterioj pri fervojaj kantinoj : 30 lokaj kantinoj ofertos nur partan nutraĵon en kioskoj kaj aŭtomatoj. 35 kantinoj estos fermataj. En 15 lokoj fervojistoj ricevos manĝaĵojn kaj trinkaĵojn nur en fremdaj gastejoj.

Sekve de nova imposto (Maut) sur germanaj aŭtostratoj DB kaj Germana Poŝto interkonsentis pri regularaj fervojtransporto de pakaĵoj kaj ekspressendaĵoj inter Köln kaj Berlin. Tiaj transportoj por la poŝto efektiviĝas jam sur la fervojlinio Hamburg - München.

En la manovra servo de varstacioj estas enkondukata la nova digitala komunikado de datumoj. La manovristoj ricevas siajn ordonojn per mobilaj sparke regataj datumiloj. La fervojistoj anoncas sian precizan lokon, ekzemple "relo 28". La sistemo liveras aŭtomate la indikojn, kiuj vagonoj kie staras kaj kio okazos pri ili. Kostoj de la projekto: 8,5 milionoj da eŭroj.

Fonto: BahnZeit 8-9/2003



Festlicher Liederabend

beim Internationalen Eisenbahner Esperanto-Kongress in Dresden am 12. Mai 2003

Ein guter professioneller Mitschnitt ist als CD zu haben

Zu hören sind 17 Arien aus Opern und Operetten, z.B. von Mozart, Beethoven, Lehar, Strauß und vielen anderen, vorgetragen in Esperanto von professionellen Sängerinnen und Sängern in einer Esperanto-Übersetzung von Joachim Gießner. Die Texte sind beigegeben. Gesamtdauer 58:52 Minuten. Verkaufspreis 15,00 €, einschließlich Versandkosten. Ein Kauf lohnt sich. Zu bestellen bei Rolf Terjung, Finkenschlag 68, 47279 Duisburg, Tel/Fax 0203-724095. Konto Rolf Terjung, Konto-Nr. 316463 bei der Sparda-Bank West, BLZ 360 605 91, Verwendungszweck: CD-Liederabend und Absenderangaben.

Leksikologio El malnovaj vortaroj Difinoj kaj meditadoj

(Brokhaus Conversationslexikon 1884) Sub PERSONTRAJNOJ

Difino : Fervojaj trajnoj, en kiuj oni nur transportas personojn kaj ties bagaĝon krom postaĵojn kaj akcelajn varojn. Oni dividas ĝenerale persontrajnoj en ordinaraj persontrajnoj kaj rapide veturantaj persontrajnoj. Oni diferencas rapide veturantajn persontrajnojn rilate ilia veturrapido en ekspresa, kuriera,, rapida kaj akcela trajno. Por mallongigi la veturtempon trans granda distanco, kiel ekzemple inter Paris kaj Konstantinopel, oni instalis lastatempe tiel nomitajn fulmtrajnojn.

Meditado : Sub "rapide veturantaj trajnoj" ni nomigus hodiaŭ IC- kaj ICE-trajnoj. Radio Eriwan respondus: Principe jes .... Sed la trajno de Hamburgo al Berlin malfruiĝas je 35 minutojn. La koneksaj trajnoj ne povas atendi. Bv. havu komprenon por tio.

Estu feliĉa, se vi ne vojaĝas al Konstantinopel.

La vojaĝanto en Germanio estu pacienca.

(Brokhaus Conversationslexikon 1884) Sub FLUGTEKNIKO

Difino: Tutaĵo de la eksperimentoj, de la homoj ebligi la flugon sendepende de la ventodirekto per mekanismoj kiuj estas pli pezaj ol la aero. Ke tio intenco ne estas kontraŭsenca pruvas ĉiu fluganta birdo, kiu ja estas animita flugmaŝino. Oni ne povas supozi, ke la homa forto sufiĉas, eĉ ne ĉe la plej sencoplena flugaparato. Oni pruvigis per eksperimentoj, ke oni la duonon de la korpopezo povas teni en ŝvebanta stato helpe de per piedoj movigataj flugiloj.

Krome oni eksciis per esplorado, ke la aerrezisto kontraŭ iom kliniĝanta kavaj tavoloj estas multe pli granda ol iam uzitaj formuloj montris. Eĉ ĉe kompleta ventomanko kaj negativa angulo de la tavolo ekestis leviĝo. El tio apartenas la arta flugado ne tute al la iluzio.

Meditado: Kiu hodiaŭ flugas ien, estu konvinkita, ke iam funkciis la supre menciita eksperimento. Tamen en la "animita flugmaŝino" suferas ankoraŭ 15% el la aviadilpasaĝeroj sub flugtimo, 20% el ili sentas flugante malkomforton ĉe kiom el ili la stomako grumblas ne estas konata. Hg

El la grupoj

Grupo Bremen
Esperanto en Interreto

Ni estas tre bonŝancaj, ke en nia klubejo, la 'Bolanta Kaldrono' komputilo estas je nia dispono. Kiam ni eniris la salonon la 10an de septembro, Franz Kruse jam estis preparinta la aparataron. Jam longe antaue la anonco de lia temo igis nin tre scivolemaj.
Unue la preleganto skizis la evoluon de la kodo por prezenti signojn. La komenca 8-bita kodo ASCII povis prezenti 256 (= 2^8) signojn La tiama memorkapacito limigis tiun kodon, kiu ja sufiĉis por prezenti la signojn de la angla lingvouzado, sed ne tiujn de aliaj lingvoj. Oni rememoru, ke germanoj devis skribi 'Mueller' anstataŭ 'Müller', ĉar mankis en tiu kodo la umlaŭtoj. Intertempe la storoj havas tian kapaciton, ke oni povas instali 32 bitan kodon, kapabla por prezenti milionojn da signojn.
Tiu progreso signifis, ke oni povas prezenti la signojn de preskaŭ ĉiuj lingvoj, ekzemple ankaŭ tiujn de la araba, japana kaj kompreneble ankaŭ tiujn de Esperanto! La uzo de la Esperanta alfabeto ne plu estas problemo, kondiĉe, ke oni havas sufiĉe modernan komputilon.
Se oni volas serĉi ion en la Interreto, oni devas uzi serĉroboton, ekzemple 'google'.
Kaj jen plua ĝojiga afero: la programo subtenas ankaŭ instrukciojn en Esperanto! Se oni nun serĉas ĉiujn germanlingvajn artikolojn, kiuj enhavas la nocion 'Esperanto',, oni ricevas liston de eble 55.000 ! artikoloj. Do, pro la amaso da indikoj oni devas pli precizigi la celon. Do, endoni ekzemple 'Esperanto Bremen' estas jam pli bone.
Pli bone eĉ estas, se la serĉata objekto havas propran retadreson ekzemple 'www.esperanto.de'. Endonante tiun adreson la ekrano montras bonarangĝitan tabelon por germanujo kun Esperanto-asocioj, -kongresoj, -literaturo, -kursoj, -vortaroj, kaj -diversaĉoj. Per la muso oni tie rekte povas elekti la deziratan temon.
Ni estu fieraj, ke la aŭtoro de tiu bone superrigardebla hejmpaĝo estas nia membro Franz!
Mirinde, kiom da informoj oni povas trovi en la Interreto!. Eĉ babilado eblas! Kondiĉe, ke mikrofono estas instalita. Bedaurinde en la 'Bolanta Kaldrono' ĝi ne estis instalita. Franz do ne povis montri tion.
En sia kutima, klara maniero Franz prezentis la fascinan evoluon de la informa tekniko, evoluo, kiu donas multajn ŝancojn al ni esperantistoj. Tion indikas la kreskanta nombro da informpetoj pri Esperanto kaj la intereso pri Esperanto-kursoj en la Interreto.

km

El la "Bolanta Kaldrono", Informilo 268 de la Esperanto Grupo Bremen

@



Benitan Kristnaskon
kaj
agrablajn festotagojn
al niaj gemembroj kaj ĉiuj niaj geamikoj.

Por la jaro 2004 ni deziras
sanon, feliĉon kaj pacon en la mondo.

Por nia movado bonan progreson!



Redaktfino por FE 1/2004 estos la 15.02.2004
Stiftung Bahn-Sozialwerk Hauptvorstand Frankfurt am Main
Schriftleitung/redakcio: Fritz Lautenbach, Abtstor 21, 36037 Fulda
Tel/Fax (06 61) 7 76 27, E-Mail: f.lautenbach@fulda-online.de
und Horst Jasmann, Otto-Nagel-Str. 10A, 12683 Berlin
Tel/Fax (0 30) 54 42 361